

Eŭropa Bulteno

Decembro 2008, № 12 (77)

Karaj eŭropaj esperantistoj!

La jaro 2008 estis unu el la plej sukcesaj jaroj por Esperanto-movado en Eŭropa Unio. La unuan fojon en la historio EU aprobis apartan subvencion por tuteŭropa Esperanto-organizo EEU simple por ties funkciado kaj tiel agnoskis ĝin grava organizaĵo por Eŭropa Unio. Ĝi subvenciis EEU-n



per 56.000 eŭroj kio ebligis starigi buroon en Bruselo kaj enoficigi profesian direktoron de la buroo. Ĝi kondiĉigis tion per tio, ke ni mem devas havi 14.000 eŭrojn da propra enspezo, pri kio ni ankaŭ sukcesis kaj tial nia ĉi-jara budĝeto kune kun parta enspezo por alia aprobata projekto (Alieco kiel valoro) proksimiĝis ĉi-jare al 80.000 eŭroj. Tio ebligis multe pli seriozan agadon kaj regulan partoprenon de reprezentantoj de EEU en preskaŭ ĉiuj internaciaj prilingvaj eventoj en Eŭropo.

Grava estas ankaŭ la fakto ke ĉi-jare ege kunaktivis kun ni ankaŭ la dua esperantistino parlamentanino de EP, sinjorino Ljudmila Novak, kiu prizorgis la unuan priesperantan ekspozicion en Bruselaj ejoj de la Eŭropa Parlamento baze de kiu realiĝis novaj kontaktoj kun sinjore Geremek.

Tial EEU proklamis ĉijare du honorajn membrojn: sinjorinojn Margaerta Handzlik kaj Ljudmila Novak.

Ni sukcese realigis du specifajn konferencojn: unu kadre de Itala E-kongreso en Grosseto en Italio pri Identeca Eŭropa Lingvo kaj alian en Bruselo en decembro pri Du- kaj plurlingva edukado. Regula kunsido de la asembleo okazis kadre de la UK en Roterdamo kiu difinis nian novan strategion en Eŭropa Unio: klopodi konvinki Eŭropan Komisionon ekokupiĝi pri lingva politiko kaj klopodi pere de nova premgrupo en la parlamento (Germek-grupo) konvinki la komisionojn pri lingvoj (tiun de L. Orban) en ilia propra propono pri trilingva strategio (propono Malauf) enkonduki lingvan katalizilon (rapidigilon) antaŭ lernado de la dua lingvo.



En la jaro 2009 okazos balotoj por nova EU-parlamento. Ni esperas ke pluraj el la nunaj parlamentanoj kiuj subtenas E-on reelektiĝos kaj eventuale elektiĝos kelkaj novaj. Kelkaj gravaj esperantistoj, samtempe oficistoj en altaj pozicioj, pluoficos en Bruselo (nia prezidanto Sean O Riain, Jozefo Reinart kaj kelkaj aliaj) kaj ankaŭ ni esperas pri sukceso en la baloto por la esperantista partio E.D.E. Ni krome esperas ricevi subvencion de EU ankaŭ en la jaro 2009.

Esperoj grandaj, sed realismaj. Malgraŭ la ĝenerala financa krizo, ni tamen povas antaŭvidi ke la jaro 2009 en kiu ni festos 150-jarojn de la naskiĝo de Zamenhof centre en EEU-kongreso en Herzberg (Germanio) fine de majo, estos - se ne pli bona, almenaŭ same bona - kiel la jaro 2008. Mi deziras al ĉiuj niaj membroj, esperantistoj de eŭropaj landoj sanon kaj optimismon por nia plua poresperanta agado.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU

MESAĜO DE LA PAPO URBI et ORBI KRISTNASKON 2008

Samkiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton "Esperanto". Plurfoje la rekta elsendo montris ilin.

Neoficiala traduko en Esperanto troviĝas ĉe:
<http://www.ikue.org/kristnasko2008/>



INTERNACIA KONFERENCO »DU- KAJ PLURLINGVA EDUKADO«

Sub tiu ĉi titolo okazis tre sukcese konferenco kiun organizis Eŭropa Esperanto-Unio en Bruselo la 10-an de decembro 2008. La konferenco okazis en la ejoj de MAI (Domo de internaciaj organizoj), kie sian oficejon havas ankaŭ EEU kun profesiaj tradukinstalaĵoj kaj aliaj servoj. Temis pri unu el malmultaj konferencoj kie esperantistoj organizis ion ĉefe por neesperantistoj kaj kun profesia interpreta servo. Ĉiu preleganto aŭ diskutpartoprenanto povis uzi aŭ la anglan, la francan, la germanan, la nederlandan aŭ Esperanton kaj ĉion oni interpretis al la angla kaj la franca. Oni disponis eĉ pri 5 profesinivelaj interpretistoj.



Partoprenis kvindeko da ĉeestantoj el deko da landoj el kiuj proksimume duono da neesperantistoj.

Dum la malfermo la konferencon salutis du eŭropaj parlamentaninoj Ljudimla Novak (Slovenio) kaj Margareta Handzlik (Pollando) kaj la reprezentanto de Eŭropa Komisiono (Ĉefdirektorejo Kulturo kaj Edukado) sinjoro Konrad Fuhrman.

La prelegoj estis dividitaj je du partoj: institucia edukado kaj privata hejma edukado. La enkondukan referaĵon faris prof. David Marsh el la universitato de Jyväskylä (Finnlando) »Dulingva edukado en la scisocieto« kaj poste sekvis prelegoj de Marc Demonty

»Kelkaj aspektoj de instruado de fremdlingvoj en mezgradaj lernejoj de franclingva Belgio» (Belgio) kaj de D-ro Seán Ó Riain pri dulingva edukado en Irlando. En la sama sekcio ni aŭdis ankaŭ la prelegojn de prof. Wim Jansen el Universitato de Amsterdam pri »Esperanto, nenies forsaltilo, ĉies alsaltloko« kaj de Krystin Tytgat de Erasmushogeschool el Bruselo pri »20 jaroj de multlingvaj Erasmus interŝanĝoj«. En la posttagmeza sesio antaŭ ol ekparoli pri familia edukado finante la matenan sesion prelegis Angela Tellier pri la brita eksperimento »Springboard« kaj D-rino Katalin Kováts pri propedeŭtika valoro de Esperanto ĉe hungaraj infanoj.

En la familia parto parolis Jozef Reinvarit pri spertoj de dulingva kaj multlingva edukado en familio de diplomato, Zlatko Tišljari pri Esperanto kiel konscia celo de infanedukado kaj D-rino Katalin Kováts pri eduko de multlingva infano en ŝia familio. Flory Witdoeck parolis pri »Ĉu aĉeti aŭ vendi en la angla«, Michael Cwik pri strategio por E en edukado kaj li ankaŭ legis refraĵon de ambasadoro Ulrich Brandenburg pri Esperanto kaj la germana kiel familiaj lingvoj.



Education and Culture DG

'Europe for Citizens' Programme

Fine oni akceptis konkludojn kaj rekomendojn por Eŭropa Komisiono, komisiejo pri edukado. La konkludojn kunaŭtoris grupo konsistinta el D-ro Seán Ó Riain, profesoro David March, profesoro Wim Jansen, D-rino Katalin Kováts, Angela Tellier, Josef Reinvar kaj Zlatko Tišljár.

Pri la konferenco aperis anoncinformo en granda senpage disdonata revuo Metro en Belgio. Partoprenis aro da instruistoj kaj ankaŭ reprezentantino de la flandra registaro.

Interpretistoj bone realigis sian taskon: Angelos Tsirimokos, Neven Kovačić, Nikola Rašić, Maike Clarysse kaj Marek Blahuš.

Grandan dankon meritas surlokaj organizantoj kiuj elspezis enorman energion por bonege ĉion antaŭprepari kaj realigi: Seán Ó Riain, Flory Witdoeck, Jozef Reinvar kaj Maja Tišljár.

Oni planas sekvajare aperigi la libron kun la referaĵoj kaj konkludoj.

La konferenco okazis dank al la financado far EU: subteno de eŭroprnivela organizoj kiuj aktivas sur la kampo de aktiva eŭropa civitaneco.

Zlatko Tišljár

VIDINTE NAPOLON, VI RAJTAS FORPASI

Sukcesa seminario de Itala Esperanto-Federacio en Napolo fermas la arangojn pri la Internacia Jaro de Lingvoj

"Vidinte Napolon, vi rajtas forpasi" diras itala proverbo, kaj efektive la seminario pri la Internacia Jaro de Lingvoj en Napolo estis tre vidinda.

La temo estis: "2008 - Internacia Jaro de Lingvoj" sed oni ne parolis nur pri ĝi, nek pri ĝi parolis la kutimaj parolistoj (Corsetti, Grazzini, kaj tiel plu). En Napolo estis ankaŭ veraj neesperantistoj, kiel la prezidanto de la Unesko-klubo kaj la prezidantino de la Universitato de la Tria Aĝo.



Aldoniĝis prelegoj pri parencaj kaj neparencaj temoj: "La lingva situacio en Afriko", Nino Vessella, "La rolo de la verkisto kaj eldonisto pri disvastigo kaj protektado de la gepatra lingvo", "Nerono en Napolo el la nova libro 'Morto de Artisto'", Anna Lowenstein, kaj kvazau fadenon tra ĉiuj tagoj okazis babiladoj de Nicolino Rossi pri esperantlingvaj poem-verkistoj, aparte pri William Auld.

Neforgeseblaj estis ankaŭ la vesperaj programoj konsistintaj el muziko, deklamado de napolaj poemoj, foje kun tradukoj al Esperanto, kaj amaso da napola muziko. Temas pri tiu napola muziko, kiu estas la vera itala popola muziko (de "O sole mio" ĝis "O surdate 'nammurate").

Renato Corsetti

SOLENAĴO ĈE UNESCO



La 15an de decembro en Parizo okazis UNESCO-ceremonio omaĝe al komenco de 150-a jaro ekde naskiĝo de L. L. Zamenhof.

La ceremonion organizis UEA kune kun la pola kaj litova delegacioj ĉe UNESCO. La ceremonion prezidis prof. Barbara Despiney. Enkondukan prelegon faris reprezentanto de Ĝenerala Direktoro, respondeculo pri la Jaro de la Lingvoj ĉe UNESCO Mauro Rosi. Salutmesaĝojn de prezidanto de UEA Probal Dasgupta kaj de vicprezidanto de AIS Carlo Minnaja legis la vicprezidanto de UEA Claude Normount. Festparoladon faris Christopher Louis

Zaleski-Zamenhof. Prelegis fama franca lingvistino Hanriete Walter. Nome de UEA parolis juna esperantistino Estelle Loiseau, kiu prezentis UK-ojn kaj IJK-ojn, bedaŭrinde sen menciil plian diversecon de E-movado.

Nome de ILEI la ceremonion partoprenis Francois Lo Jacomo, Jean-Pierre Boulet, reprezentantoj de ILEI ĉe UNESCO kaj Aida Cizikaite, estrarano de ILEI. Francois Lo Jacomo diris kelkajn vortojn, menciis, ke li reprezentas ILEI kaj montris per komputilo parton de filmeto "Esperanto estas" de E@I (en Esperanto kun franclingvaj surskriboj).

Fine de la ceremonio sekvis diskuto. Entute la ceremonion partoprenis ĉirkau 400 personoj, plejparte el Francio, sed ankaŭ el kelkaj aliaj pli aŭ malpli proksimaj landoj. Preskaŭ ĉiuj paroloj okazis en la franca kun samtempa traduko al Esperanto. Nur salutmesaĝoj estis lautlegitaj en Esperanto kaj tradukitaj al la franca. Unura esperantlingva interveno dum la diskuto restis sen traduko.

Lau invito de Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet al la ceremonio venis eldonisto (li ja estas princo de unu el triboj) Hubert Guezo el Benino, la sama kiu partoprenis inaŭguron de nia konferenco en Portonovo. Li jam havas kontaktojn kun esperantistoj, planas kunlaborojn kaj tre interesiĝas pri projekto, kunordigata de Vlad'ka Chvatalova. Mi kaptis la okazon kaj prezentis konferencon en Portonovo ĉe UFE kaj festa kunveno de SAT Amikaro, menciante ankaŭ de Vladka Chvatalova kunordigatan projekton, kiu naskiĝis lige al ŝia partopreno en ILEI konferenco en Benino kaj estas unu el postsekvoj de konkreta kunlaboro inter eŭropaj kaj afrikaj esperantistoj.

Festa parolo de C. L Zaleski-Zamenhof videblas en

http://www.dailymotion.com/video/x7r45x_louis-zaleski-zamenhof-lunesco_news

Prelego de lingvistino H. Walter videblas en

<http://www.ipernity.com/doc/fsoghomonian/3655103/>

Kelkaj surpodiaj fotoj videblas en <http://dl.free.fr/tsuXKgj65> (eblas ilin elŝuti dum minimume 30 tagoj)

Aida Cizikaite

NOVA KANDIDATIGO DE UEA POR PACPREMIO

"Estimata sinjoro,

Mi havas por vi agrablan donacon kristnask-novjaran. Kun plezuro mi povas informi vin, ke la Buroo pri Internaciaj Rilatoj de Pola Sejmo finfine sendis la rezolucion de Pola Sejmo por honori la 100-jaran datrevenon de la fondo de Universala Esperanto-Asocio al la Nobel-Komitato. Mi estas certa, ke vi havas sian ne malgrandan kontribuon en la efika fino de la proceduro.

Mi estas plena de admiro pri via persisto kaj via engaĝiĝo en la afero.

Kun estimo,

Jerzy Szmajdziński (Vic-Prezidanto de Pola Parlamento /t.e.: Marŝalo de Pola Parlamento)"

KOMUNA ZAMENHOFA TAGO EN KRAGUJEVAC



Ĉi-jare serbiaj esperantistoj komune festis Zamenhofan tagon, sabaton la 13an de decembro, en urbo Kragujevac, kie iam estis tre vigla Esperanto-movado kaj kie nun ĉi tiu festo estis utiligita por denova fondo de Esperanto-societo.

Iniciatinto kaj organizanto de ĉi tiu kunveno estis konata kragujevaca esperantisto kaj aktoro Saŝa Pilipoviĉ. Gastoj alvenis el Beograd, Niŝ, Zemun, Jagodina, Leskovac, Vranje, Zajeĉar, Ĉaĉak kaj Novi Sad, kaj partoprenis ankaŭ Viŝnja Brankoviĉ el Triesto kaj Miĉo Vrhovac el Banja Luka (Srpska, BiH). Apud riĉenhavaj prelegoj de

Boriŝa Miliĉeviĉ, mr Radojica Petroviĉ kaj Tereza Kapista, en la programo partoprenis ankoraŭ Ĉedomir Ŝtajn kaj Nikola Milojeviĉ, aktoroj de urba teatro, poetino Senka Tomiĉ el Jagodina, lernantoj de zemuna lernejo por lernantoj kun difektita vidpovo kie Esperanton oni instruas seninterrompe okdek jarojn, kaj la ĉeestantoj povis vidi partojn el kabaredoj de Saŝa Pilipoviĉ prezentitaj dum pasintaj universalaj kongresoj.

Reprezentantoj de Esperanto-societoj el aliaj urboj donacis al la novfondinta societo dudekan da esperantaj libroj.


Post la oficiala programo estis organizita komuna tagmanĝo kaj la ĉeestantoj vizitis memorparkon Ŝumarice. Poste en amika etoso plu daŭris amuza muzika programo dum solena vespermanĝo en hotela restoracio.

Tagĵurnalo "Politika" (www.politika.co.rs) aperigis iom longan tekston pri la festo sub la titolo "Kragujevac revenas al Esperanto".

Dum la festo oni povis aĉeti du novajn esperantajn librojn: **Historio de Esperanto** de A. Korĵenkov, tradukita en la serban el Esperanto kaj **Sonĝo pri amo kaj morto** de Filip David, konata serba verkisto. La libron esperantigis Agnesa Eremija, membro de beograda Esperanta-societo.

Dimitrije Janĉić

LERNU ESPERANTON - EKKONU LA MONDON



Slovena asocio por intrernacia lingvo kaj urba komunumo kaj biblioteko de Punta Umbria (Hispanio) organizis rimarkitan ekspozicion pri Esperanto.

En la regiono kie ni decidis travivi kelkajn monatojn (por eviti vintran malvarmon) ĉijare okazis nenio por soleni Zamenhofan tagon. Tial ni decidis ŝanĝi la kutimon kaj sendepende de lokaj entuziastoj prepari esperantan ekspozicion en loka biblioteko sub la titolo

"LERNU ESPERANTON - EKKONU LA MONDON!"

Loĝantoj de Punta Umbria, malgranda urbeto en suda Hispanio kun intereso vizitis la ekspozicion kun 180 ekzempleroj da diversaj libroj, ĵurnaloj, revuoj, turismaj prospektoj kaj aliaj esperantaĵoj.

Ni deziras danki al homoj kiuj apogis nin kaj helpis realigi la ideon: Julio Herero el Malago (kun loka esperanto asocio), Kani el Don Benito kaj Alejandro Pareja el Madrido.

La urbestro kaj la biblioteko faris ĉion kio estis bezonata (presado kaj disvastigo de afiŝoj, invitiloj kaj disponigo de konvena ejo por fari la ekspozicion - ĉion senpage) kaj la 15an de decembro je la 17.30 horo okazis solena malfermo kun ĉeesto de loka televido kaj ĵurnalistoj. Solena parolanto estis konsilantino por kulturo de loka urbestro.

Kvankam unue ni havis interkonsenton por du-taga ekspozicio, ili proponis ke la ekspozicio daŭru ĝis vespero de la 22-a de decembro 2008.

Dum la postaj tagoj lokaj gazetoj aperigis (ĝis nun ni vidis) 5 grandajn artikolojn pri la ekspozicio.

Danica kaj Đorđe Obradović



DISKUT-FORUMO PRI MULTLINGVECO EN EŬROPA UNIO

okazis la 23an de oktobro en kongres-salono de Ministerio de eksterlandaj aferoj de Slovakio. Ĝi realiĝis okaze de oficiala vizito de EU-komisionano pri multlingveco Leonard Orban en Slovakio.

Bonvenigis ĉiujn ministro pri eksterlandaj aferoj de SR Ján Kubiš. Dum lia parolo li substrekiis, ke en la triangulo de la rilatoj en EU – ekonomio, politiko, kulturo – ĝuste la lasta postrestas kaj al ĝi ankaŭ apartenas lingvoj kaj ke nun oni devas koncentriĝi je plifortigo de subteno al tiu ĉi 3-a temo.

Post lia mallonga enkonduko kaj bonvenigo sekvis malfermo de la aranĝo far vicministro de la registaro de Slovakia Respubliko Dušan Čaplovič.

Lia elpaŝo estis vere elstara – sobra, racia, kun pluraj pensigaj elementoj. Čaplovič komencis per enkonduko, ke la defio de plur/multlingveco havas 2 aspektojn:

1: kiel sekurigi la evoluon de ĉiuj lingvojn je digna nivelo

2: kiel – malgraŭ la multlingveco – facile kaj komforte (rapide) reciproke komuniki

* kiel diris la vicministro: „La solvo ne estas facila – kaj portas kun si eksplodigan potencialon“

* La plej sentema elemento estas laŭ li „instituciigo kaj formo“, ne la komunikado mem.

Post tiu ĉi enkonduko Čaplovič proponis „historian ekskurson“ - rilatan al la lingva hegemonio. Li prezentis la imperiojn grekan kaj romian – tiam menciante, ke „mi opinias la latinan mezepoka Esperanto“.

Parte kadre de la surloka historio li menciis la slovakon „geospacon“ - kiu kunportis novan econ – malnovslavan lingvon „staroslovienčina“ - kiu estis la liturgia slava lingvo. Sekvis informoj pri la agresa lingvopolitiko de hungaroj (kies negativaj trajtoj sentebblas ĝis la nuna tempo) kaj pri posta germanigo.

Sekve malfermiĝis la demando, ĉu post tia historia „leciono“ oni akceptu simple la anglan kiel komuna lingvo? „Estas logike, ke je labor-nivelo oni uzas 1 aŭ 2 lingvojn, kaj tion oni faris/as per „natura elekto“ - kion plej ofte nuntempe signifas la anglan, sed certe NE por ĉiam!“ diris la vicministro.

Surbaze de komparo kun helenismo, romia imperio, habsburga monarkio – necesas reciproka estimo, akceptado de valoroj kaj transpreno de respondeco.

Plurkultureco kaj plurlingveco signifas ne misuzadon sed respektadon de reguloj

Aldone oni atentu pri la krizo de identeco – ĉefe videblan ĉe enmigrintoj.

Grava punkto de la elpaŝo de Čaplovič estis pri slavaj lingvoj:

Li menciis ke en EU nun ja estas reprezentitaj 3 grandaj lingvaj grupoj (ĝermana, romia, slava), kaj kvankam en EU estas 5 slavaj ŝtatoj (PL, SK, CZ, SI, BG), baldaŭ ev. 2 novaj, la slava lingvo-grupo NE estas reprezentita en EU-institucioj – kie devus almenaŭ la pola ludi signifan rolon!

Avantaĝo de iu el la slavaj lingvoj en tiuj institucioj estus por la ceteraj slavaj landoj ilia relativa simileco, helpanta en la labora komunikado.

„Necesas daŭra respektado de la principo – EU estu pli proksima al siaj civitanoj!“

Fine de la parolo la vicministro atentigis pri la citaĵo de eksa prezidanto de Eŭropa Komisiono Jacques Delors, kiu jam en la jaro 1994 diris la jenon:

„Lingva problemaro tuŝas la radikojn de eŭropa komunumo. Lingvo estas parto de nacia kaj persona identeco kaj eŭropaj lingvoj estas parto de granda kultura heredaĵo de la kontinento.

Se la komunumo (EU) plu kreskos, certe kreskos ankaŭ la praktikaj malfacilaĵoj – doni al lingvoj de siaj membroŝtatoj egalan respekton. Sed ĉiu solvo, kiu ignorus tion, skuus la bazojn de la komuna koncepto."

Post la parolo de Ĉaplovič sekvis kontribuo de komisionano Orban kun la titolo:

Plurlingveco kaj interkultura dialogo.

Komence li atentigis pri unikaĵo de Bratislava – kiel ununura ĉefurbo en EU – staranta efektive ĉe la landlimo – kaj eĉ kun 2 aliaj landoj (HU, AT) - aldone troviĝanta en la „koro de Eŭropo“. Li plilarĝigis la temon pri koncepto de landlimoj – kiuj estis ĉiam unua loko por interŝanĝo – unika loko de vojaĝoj kaj reciproka interŝanĝo – de spertoj, varoj, lingvoj... Li daŭrigis pri avantaĝoj de la nuna EU – pri eblecoj de „Malfermita kontinento“, kiu donas grandajn ŝancojn al la popoloj.

Sekvis mallonga informo pri la Jaro de interkultura dialogo – 2008, pri Mallouf-raporto, pri graveco de lernado de lingvoj, kiu igas nin pli malfermitaj, komprenemaj kaj forigas ksenofobion. Fine li atentigis pri neceso de alta nivelo de scipovo de lingvoj – kiu helpas ekz. ĉe merkato, interkonsentoj kun komercaj partneroj de aliaj landoj...

Dum la diskuto estis starigita nur 1 demando, kiu estis rapide respondita, ĉar la ŝtatestroj kun Orban devis laborkiale foriri de la forumo, kiu estis daŭrigita per ceteraj prelegoj kaj diskutoj. (Ne eblis al mi elpaŝi kun priesperanta demando dum ilia ĉeesto, mi faris tamen en la dua parto de la forumo).

La sekva elpaŝo post la paŭzo estis:

Politiko de plurlingveco de Eŭropa Komisiono kaj plurlingveco en konteksto de Slovakio de PhDr. Vaškaninová de Ŝtata Pedagogia Instituto (ŠPÚ Bratislava).

Ŝi informis pri la nunaj paŝoj de Slovakio kaj la Instituto rilate lingvoinstruadon. La plej gravaj estis informoj, ke nun en Slovakio daŭras 8-jara periodo, dum kiu oni enkondukas la instruadon de 2 fremdaj lingvoj al ĉiuj lernejoj. La 1a fremda lingvo estas instruata ekde la 3a klaso en bazlernejoj.

Post la kafopaŭzo sekvis 3 lastaj prelegoj:

Ebloj de lingva juro en kondiĉoj de plurlingveco de prof. Kořenský (Filozofia fakultato de Universitato de Palacký en Olomouc, Ĉeĥio) – temis pri faka kaj interesa prelego pri la jura vidpunkto pri lingvoj. Lingva juro okupiĝas pri la funkcia spektro de lingvo. Minimuma formo de la lingva juro (leĝigo en iaspeca formo) ĉiam aperas ĉe la kreado de ŝtataj formoj. Tamen neniu leĝo plene kovras la tutan skalon/gamon da lingvoj. Ne ekzistas komunumoj, kiuj almenaŭ parte ne influadus/ne havus lingvan juron (leĝaron).

Por la estonto la profesoro profetas kreskon de postuloj por lingva juro laŭ komplekseco kaj enhavo. Ekz. Eŭropa Unio postulas jam la kreon de juraj normoj – kiuj tamen plej ofte aperas „Ex post“, do nur post kiam aperas problemoj pri lingvouzado, sekvas bezono de kreo de lingva juro. Nuntempe estas laŭ li jam videbla (kaj ĝi kreskos) lingva neegaleco – la funkcia neegaleco. Tio sekve signifas, ke eblas antaŭvidi, ke pluraj naciaj kaj regionaj lingvoj konserviĝos nur kiel voĉe/buŝe funkciantaj, en la estonteco ili povos malgraviĝi (regresi) sur gravaj kampoj – merkato, ekonomio, juro, ... - okazos regreso de funkciaj karakterizaĵoj.

Tamen laŭ li devas resti la eblo aktive uzadi la propran lingvon. Krome laŭ li aperas neceso pri 2-a lingvo – por la internacia komunikado.

Necesas laŭ li arde „batali“ por la identeco – kontraŭ la kripligo de lingvoj.

Necesas krome formuli skalon da komunikaj rilatoj – eduka, interna, ekstera, internacia...

Sekvis la prelego: Pli da lingvoj – pli da kulturoj de prof. Erich Mistrík (Katedro de etiko kaj civitana edukado de Pedagogia fakultato de Komenio-Universitato en Bratislava, SK)

Lia elpaŝo estis iom ekster-tema, li prezentis verkon „Ulysses“ de James Joyce kaj demonstris plurajn tradukojn de ĝi (SK, CS, RU) – fine konkludante - „Pro kio ni bezonas tiom da lingvoj? Por ke tiaj belaĵoj, artaj tradukoj povu ekzisti“.

La lasta prezentis referaĵon Juraj Alner: Lingvo-politika strategio de SR kiel membroŝtato de EU. Enkonduke li reagis al siaj antaŭuloj, komentis iliajn parolojn. Sekvis prezento de la „Nacia konvento pri EU“, kies membro li estis. Li prezentis la dokumenton (Lingvo-politika strategio de SR kiel membroŝtato de EU), kiun kreis (surbaze de mendo de Ministerio de Eksterlandaj Aferoj) la teamo, al kiu li ankaŭ apartenis (rim.: en la krea teamo estis 3 esperantistoj, ankaŭ pro tio ĝi estis sufiĉe progresita). Li bedaŭris, ke la materialo mem restis „ŝlosita“ en la ministerio, kiu ne pretis ĝin publikigi (ŝajne pro tro ambiciaj kaj novecaj aliroj) kaj do restis nekonata al la vasta publiko. Same li esprimis malĝojon pri la fakto, ke la Nacia konvento ne plu funkcias kaj ke do ne ekzistas faka bazo por diskuti la lingvo-politikajn demandojn.

Fine li rimarkis, ke necesas „flegi lingvojn (zorgi pri ili), ne protekti ilin“ kaj aldone atentigis pri graveco de dialektoj kaj bezono de ilia daŭra vivo kaj funkciado.

Sekvis diskuto. Dum la diskuto mi havis eblon elpaŝi kaj mi dividis ĝin al du partoj:

En la unua mi demandis prelegantojn (kaj ĉeestantojn), ĉu laŭ ili la proponata kaj daŭre ripetata barcelona modelo pri lernado de lingvoj en EU „1+2“ - do nacia lingvo plus du fremdaj – estas el la praktika vidpunkto sufiĉa kaj bona? Kiel ekzemplo mi prezentis komparon, se mi – slovako scipovanta 5-6 lingvojn (ekz. sk, cs, pl, de, en, ev. aldone ru) volus paroli kun rumano Orban, scipovanta teorie ankaŭ 4-5 lingvojn (ro, it, fr, hu, ev. aldone bg) – ni ne sukcesus, malgraŭ nia komuna scipovo de 10 lingvoj. Do la bezono pri iaspeca komuna lingvo por faciligi, aŭ eĉ entute ebligi komunikadon al EU-civitanoj estas evidenta.

En la sekva punkto mi atentigis pri la ekonomia vidpunkto de lingvopolitiko – kiun neniu dum la forumo menciis, tamen ĝi estas ege grava kaj certe atentinda.

Mi utiligis informojn pri Grin-raporto, citante kelkfoje la aŭtoron. Tiam mi per liaj vortoj uzis unuafoje vorton Esperanto – kaj informis ke pro mia 8-jara sperto kun tiu ĉi lingvo kaj ĝia ĉiutaga uzado, samkiel pro plurjaraj laboraj spertoj ankaŭ kun kelkaj naciaj lingvoj mi povas atesti, ke tiuj konkludoj de prof. Grin estas pravaj kaj indus okupiĝi pri ili.

Al mia elpaŝo neniu volis/pretis reagi, oni do ankoraŭ levis 2 demandojn kaj tiel la forumo finiĝis.

La forumo ne alportis ian novan vidpunkton, esence temis pri ripetado de la samaj frazoj (subteno al plurlingveco, la angla ne sufiĉas, oni lernu 2+1 lingvojn...) sen ajna nova elemento, pensiga, inventema enhavo. Pensiga kaj racia tamen estis la parolo de la vicministro Ĉaplovič, kiu denove konfirmis, ke li havas sobran rigardon kaj kapablas la temon tuŝi de pluraj vidpunktoj kaj proponi alternativojn.

Evidente mankas tuteŭropa diskutado je faka nivelo pri la temo de plurlingveco, samkiel mankas komuna lingvo-politiko. Jen la kampo de EEU kaj de esperantistoj ĝenerale.

RIM.: Interesa fakto estas, ke la vicministro Dušan Ĉaplovič konsentis aŭspicii junularan vintran E-aranĝon Ago-Semajno en Slovakio: www.as.pej.pl

Peter Baláž

KIEL PREPARI FESTOTAGAJN KUKOJN

Kun la artikolo mi invitas vin skribi artikolojn pri kutimoj el via lando, kiujn ni ĉiuj volus ekkoni. Multaj por ni tute kutimaj aferoj eĉ por proksimaj najbaraj popoloj estas tute nekonataj. Dividu vian kulturon kun ni.

Tradicio de Kristnasko kaj Novjaro estas ligita ankaŭ kun pli riĉa oferto de manĝoj. En Slovenio neniŭ festo povas okazi sen "orehova potica" (envolvita kuko kun juglanda enhavo). Sed oni preparas ankaŭ multajn aliajn, en kiuj tradicie estas juglandoj, mielo, vanilio...

Ĉi foje mi prezentos al vi same kutimajn kukojn kiujn ni nomas "juglandaj hornetoj".

Por prepari oni bezonas:

100 g de butero

100 g de juglandoj

250 g de fajna faruno

kelkaj gutetoj de vanilia aromo

50g (por pasto) +50 g de sukero (muelita)

2 supkuleroj de lakto

Ĉion menciitan oni miksas farante fragilan paston. Lasas ĝin ripozi dum duono da horo. Poste oni faras cilindrojn ĉirkau 7 cm longajn kaj 0.5 cm dikajn. Oni metas ilin en poton por baki iom kurbigante ilin. La kukojn oni bakas je 180 gradoj Celziasaj dum 8-10 minutoj. Ankoraŭ varmajn kukojn oni metas en la muelitan sukeron.

Kiam ili malvarmiĝas, ili povas esti servataj sur via festotaga tablo. Bonan apetiton.



ESPERANTO KAFEJO

Esperanto Cafe estas unika loko, kiu troviĝas en la koro de Bjalistoko, ĉe la Urba Foirplaco. Interne de historia konstruaĵo, la Urbodomo, en kiu troviĝas Esperanto Cafe, vi povas karesi vian buŝon per bongustegaj desertoj en aromo de perfekte preparita kafo. Ĉi tie vi povas spekti ekspoziciojn, kiuj rilatas al la vivo kaj akiraĵoj de la kreinto de Esperanto – Ludoviko Zamenhof, al aspekto de iama Bjalistoko kaj multaj aliaj prezentoj de verkoj de modernartaj kaj malnovaj artistoj. Esperanto Cafe estas ne nur perfekta loko por komerca kunsido en la urbocentro, por bongusta tagmanĝo aŭ deserto kun kafo. Ĉi tie vi povas ankaŭ rendevui vespere kun amikoj kaj malsteĉiĝi ĉe kaliko da bonkvalita alkoholaĵo.

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 23-an de decembro 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljari, Renato Corsetti, Peter Baláž, Aida Cizikaite, Danica kaj Đorđe Obradović, Dimitrije Jančić kaj Vesna Obradović.

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu



Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj" 2007 – 2013.